★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Historio de Ukrainio

**Prelegos: Oldřich Arnosšt Fischer**

Senkulpigante insideman kaj brutalan atakon de sia armeo kontraŭ Ukrainio ruslanda diktatoro proklamis, ke teritorio de Ukrainio apartenas al rusoj kaj ukrainoj ne estas nacio. Li ripetis nur tion, kion antaŭe proklamadis ruslandaj caroj. Sed kiu estas la vero?

Kiu reĝidino el Kijiva Ruslando edziniĝis en Francion? Kiam tataroj konkeris Kijivon? Kiel ekestis kozakoj? Kiam ukrainoj fariĝis moderna eŭropa nacio? Kiu malpermesis uzadon de ukraina lingvo en Ukrainio? Kial en grenejo de la mondo milionoj da homoj mortis de malsato? Kiuj estis Ĥmelnickij, Mazepa, Ŝevĉenko, Bandera, Burlak k. a.? Kiu estas sorto de krimeaj tataroj? Nuntempe tuta la mondo fiksas sian rigardon al Ukrainio. Oni bezonas scii ukrainian historion kaj ne kredi al mensogoj.

Ĉeesta programo. Ĝi estas registrota.

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 31-an de majo 2022 je la 18-a h.

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



Prelego pri la Interlingvistikaj Studoj dum la 9-a Irana Kongreso: https://www.youtube.com/watch?v=okbznkrcicw, komencigxas je la 3.00 horo, en la tria parto (3.25) okazas prezento de la magistraj studoj.

- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto. **Prelegeon pri Arbarista Panteono vi povas spekti en jutubo**.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio Mi jam aliĝis. Ĉu mi estos la sola ĉeĥo en Litovio?
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Milan Kolka
prezidanto